

Horizon-TAAL

Jaargang 48 - nummer 280

juli-augustus 2016



www.esperanto.be

Met steun van de Vlaamse Gemeenschap

OPROEP / ALVOKO

Eerst en vooral onze verontschuldigen dat, door een ongelukkige samenloop van omstandigheden, *Horizontaal mei-juni 2016* werd verstuurd vol met Nederlandse en Esperanto-taalfouten. Wie wenst kan de juiste versie in pdf-formaat aanvragen.

Ander slecht nieuws: Pieter-Jan Doumen heeft ontslag genomen als hoofdredacteur van *Horizontaal*. Wij danken hem uiteraard voor de vele jaren van trouwe en regelmatige inzet om ons tijdschrift te vullen met interessante artikels en commentaar.

Wie voelt zich geroepen om hem op te volgen?

Wie wordt de volgende hoofdredacteur?

Tweemaandelijks tijdschrift, uitgegeven door de Vlaamse Esperantobond v.z.w.

48ste jaargang - juli/augustus 2016

Versijnt de 1ste van elke oneven maand

Overname van artikelen is vrij op voorwaarde dat de bron wordt vermeld en een exemplaar aan de redactie wordt gestuurd

Redactie en administratie: Vlaamse Esperantobond v.z.w. - Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
tel.: 03 / 234 34 00 - Epost: horizon.taal@esperanto.be
webstek: <http://www.esperanto.be/fel/nl>

Abonnementen: 25,00 EURO

Rekeningen: t.n.v. Vlaamse Esperantobond, Antwerpen
KBC IBAN BE31 4025 5105 3155, BIC: KREDBEBB
de Post IBAN BE66 0000 2653 3843, BIC: BPOTBEB1

Redactie: vakas

Tekstopmaak: Eriko D'Hondt

Medewerkers: Marc Cuffez, Ivo Durwael, Paul Peeraerts, Roland Rotsaert, André Ruyschaert, Jean-Pierre Van den Daele, Emiel Van Damme, Kris Panis, Mireille Storms, Ivo Vercammen e.a.


Verantwoordelijke uitgever: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, B-2000 Antwerpen, Belgio

Advertentietarieven: (alle prijzen zijn in euro)

* Inlassing van 3x dezelfde advertentie van een drukklaar geleverd exemplaar
Btw-tarief van 21% op deze tarieven.

1-malig 3-malig* 6-malig*

formaat 1/1	257	625	1000
formaat 1/2	150	375	600
formaat 1/3	110	275	440
formaat 1/4	80	200	320
formaat 1/8	55	140	220
formaat 1/12	30	75	120



Op 5 augustus 1976 stierf de Nederlandse dichter Adriaan Roland Holst. Zijn bekendste werk, *Deirdre en de zonen van Usnach*, verscheen in 1916. Een Esperantovergaling van de hand van Christian Declerck, *Dirdri kaj la filoj de Usnaĥ*, is in 1988 gepubliceerd door FEL, waar het voor de luttele prijs van 5 euro nog steeds verkrijgbaar is.

Dirdri kaj la filoj de Usnaĥ (Adriaan Roland Holst)

Mallonga romano inspirita de keltaj elementoj, kiu disvolviĝas en Irlando. Perleto sur la krono de la nederlanda literaturo, majstre tradukita de Christiaan Declerck.

Paĝoj: 52; formato A5; vinktitaj; 1988.

Serio Stafeto, n-ro 8; ISBN 90 71205 24 X.

Prezo: 5,00 eŭroj

Verko gravada de vortmagio

Precize antaŭ cent jaroj, en 1916, aperis la unua proza verko de Adriaan Roland Holst, kiu baziĝas sur la kelta mitologio: *Dirdri kaj la filoj de Usnaĥ*, verko gravada de brila vortmagio kaj sopiro je neatingebla, vento kaj maro. Ĝian 100-jariĝon oni intencas festi inter la literaturamantoj. Kiel esperantistoj ni kunfestu! – Christian Declerck majstre tradukis ĝin por ni.

Adriaan Roland Holst (1888-1976) estas poeto nederlandlingva, kiu fojfoje verkis ankaŭ proze. Junaĝe, leginte poemaron de sia onklino, la poetino Henriëtte Roland Holst-van der Schalk (1869-1952), li subite konsciiĝis, ke tion fari estas lia estonto: li devos fariĝi poeto.

Baldaŭ siajn unuajn poemojn li verkis kaj en 1908 li debutis en la revuo *De XXe eeuw* (La 20a jarcento), kiun redaktis la aŭtoro kaj kritikisto Lodewijk van Deyssel. En 1910 sian unuan poemaron li sendis al eldonisto, kiu pro apogo de lia amiko la poeto P.N. van Eyck akceptis kaj eldonis ĝin: *Verzen* (Versoj) – kiu aperis en 1911 – estas tre neegala poemaro, en kiu tamen jam klare reliefigas kelkaj el liaj ĉefaj temoj: la maro, la amo, la vivo kiel fremdulo inter la ceteraj.

En 1918 ĝis sia morto li loĝis sola en domo apud la maro en la urbeto Bergen. Post lia morto tiun domon oni transformis en laborejon por laŭvice tie loĝanta kaj verkanta aŭtoro proza aŭ poeto.

Mistika

En la 30aj jaroj aperis lia plej konata poemciklo *Een winter aan zee* (Vintro apud la maro), kiun en 1962 mi legis kun grandega admiro, tiom forta, ke tiun poemaron mi nepre volis mem posedi. Tamen pagi la libreton (tiutempe nur 1,50 guldenojn) mi ne povis, do mi ĝin mane kopiis. Preskaŭ samspire mi ankaŭ kopiis la romaneton *Dirdri kaj la filoj de Usnaĥ*: ankaŭ ĝi vere fascinis min. Mi apenaŭ povus vortigi kial, la lingvaĵo estas mistika, kun „grandaj vortoj”, bele strukturita rakontado, kun multe da simboloj, ofte ne estas klare, kion la simboloj indikas – minimume ili indikas ion grandiozan ...

Same kiel en multe da liaj poemoj, ankaŭ en *Dirdri kaj la filoj de Usnaĥ* lia lingvaĵo daŭre atestas ian mitologian sopiron al sublimuma, majesta soleco, iu estado inter vento kaj maro – neatingebla de ni kutime ĉiutagaj homoj. Dum jaroj, ekde la 30aj jaroj de la pasinta jarcento, oni ofte indikis lin kiel „la princon de niaj poetoj”, eĉ en taggazetoj – li ricevis ĉiujn literaturajn premiojn.

La 19an de novembro 2009 la tiama belga ĉefministro, kaj posta prezidanto de EU, Herman Van Rompuy, parkere citis en la Ĉambro de Reprezentantoj kvar versojn el la poemo “De ploeger”.

Gerrit BERVELING

De ploeger

Ik vraag geen oogst; ik heb geen schuren,
ik sta in uwen dienst zonder bezit.
Maar ik ben rijk in dit:
dat ik de ploeg van uw woord mag besturen
Ik zal de halmen niet meer zien
noch binden ooit de volle schoven,
maar doe mij in den oogst geloven
waarvoor ik dien ...

La plugisto

Rikolton mi ne petas, tenejojn ne havas,
Mi servas ja vin sen posedaĵo,
Sed mi riĉas en ĉi tio:
ke la plugilon de via vorto mi povas stiri.
La kulmojn mi ne plu vidos
nek kunigos la plenajn garbojn,
sed lasu min kredi je la rikolto
por kiu mi servas.

Estimataj samideanoj,

Por nia Beneluksa Kongreso 2016, ni ĉifoje intence elektis malgrandan urbon (Lier) por des pli bone diskonigi la ekziston de Esperanto – en eta urbo ni pli okulfrapas, ĉu ne? Ne senkiale ni enprogramigos diversajn aktivecojn por nesperantistoj, i.a. surprizan eventon (Flashmob = Fulmobanda prezento) en la centro de urbo. Sed sen Esperantistoj tio ne vere konvinkos. Do ni bezonos vin, se nur por partopreni la surprizan eventon.

Alia atuto. Veronika Poor, nova direktoro de UEA, honorigos nin per sia ĉeesto, i.a. partoprenanta la seminarion pri ‘Varbado por Esperanto’. Ne maltrafu tiun interesan kaj espereble instruplenan seminarion.

Kaj laste. Ni plilongigis la duan aliĝperiodon ĝis la 23a julio. Profitu ĝin kaj tuj aliĝu. Aliĝi sen tranoktado aŭ partotempa partoprenado evidente eblas sed tuttempe partopreni kaj tranokti finance helpus nin.

Ĉu ni vidos vin en Lier? Vizitu nian retejon.

ESPERANTO DANKAS VIN!

Beste Esperanto-vrienden,

Voor ons Benelux-Kongres 2016 kozen wij dit keer voor een kleine(re) stad (Lier), om op die manier Esperanto des te meer in de kijker te zetten - in een kleine stad vallen we meer op, niet waar? Niet zonder reden programmeren we dan ook diverse activiteiten voor niet-Esperantisten, o.a. een verrassingsact (flashmob) in het stadscentrum. Maar zonder Esperantisten overtuigt zoiets niet, hé. Wij hebben jullie nodig, al was het maar om deel te nemen aan de flashmob.

Andere troef. Veronika Poor, nieuw aangestelde directeur van de WereldEsperantoBond komt ons vereren met haar aanwezigheid. Ze zal o.a. deelnemen aan het seminarie over ‘Werven voor Esperanto’. Mis dit interessante en leerrijke seminarie niet.

En tenslotte. Wij verlengden de tweede inschrijvingsperiode tot 23 juli. Maak er gebruik van en schrijf je snel in. Inschrijven zonder overnachting of een deeltijdse inschrijving is mogelijk maar voltijds deelnemen en overnachten zou ons financieel wel helpen...

Mogen we je verwelkomen in Lier? Bezoek onze website.

ESPERANTO DANKT JE!

Piet Glorieux, nome de Flandra EsperantoLigo

BeNeLuxsa-Kongreso BNLK

FEL Esperanto-Congres

In Samenwerking met België (Vlaanderen, Wallonië, Brussel), Nederland en Luxemburg.



Wanneer?: 16 - 19 september 2016

Waar? Cultuur-hostel “Bed-Muzet”

Volmolenstraat 65, 2500 Lier. Het verblijf ligt op voetafstand van het station en van het centrum van de levendige stad Lier

Voor wie? Ons congres is voor iedereen: volwassenen, jongeren, kinderen, beginners en gevorderden, vloeiende praters en stille genietters, BeNeLux-bewoners of buiten-BeNeLux-bewoners.

Wat? Dit! Reeds lang is het BeNeLux-Congres **dé Esperanto-bijeenkomst in de BeNeLux**: Internationaal dankzij de deelnemers die niet enkel uit Vlaanderen, Wallonië, Brussel, Nederland of Luxemburg komen, maar ook van ver buiten die grenzen. Dit congres wordt professioneel georganiseerd en is toegankelijk voor iedereen. Bovendien zorgen we steeds voor betaalbaar én comfortabel onderkomen én smakelijke maaltijden. Net als voor de vorige BeNeLux-congressen bereiden we een gevarieerd en aantrekkelijk programma met: Esperanto-cursussen voor elk niveau met mogelijkheid tot examens, vakkundige voordrachten, diverse soorten verrassende concerten, ateliers zowel voor volwassenen als voor kinderen, wandelingen, en dagelijks een keuze aan diverse excursies, onder andere dagelijks een andere fietsuitstap. En uiteraard dé boekendienst van FEL (als U de boeken tijdig bestelt zullen ze voor U klaar liggen).

Enz Enz. Het is gewoon **dé extra gelegenheid voor beginners, gevorderden en experts** om dit jaar in 4 intense dagen Esperanto toe te passen en te verspreiden.

Voor al Uw vragen en suggesties: Nicky Janssen nicky24@telenet.be 0488 35 22 02

MIA MALGRANDA KONTRIBUO KONTRAŬ TERORISMO

Paŭl PEERAERTS

korespondanto
de MONATO en Belgio



Usono havas sian *nine eleven*, sian dek-unuan de septembro, Parizo sian dek-trian de novembro kaj nun Bruselo sian dudek-duan de marto, datojn en kiuj ĉio ŝanĝiĝis. En la tagoj antaŭ tiu fatala mateno ĉiuj plimalpli havis la saman amaran ideon: La demando ne estas „ĉu teroristoj iam okazos en Belgio?“, sed „kiam ili okazos?“.

Ĉio ŝanĝiĝis, ne nur en la vivo de la viktimoj kaj de iliaj familio kaj amikaro, sed en la ĉiutaga vivo de la tuta loĝantaro. Jam monatojn antaŭe policanoj kaj militistoj patrolis en Antverpeno, en Bruselo, en Lieĝo kaj en ĉiuj iom grandaj urboj de Belgio kun la mitraloj pafpretaj. Ili ricevis ridetojn kaj manpremojn, eĉ florojn aŭ donacetojn fojfoje, de homoj, kiuj profunde interne pensis: „Vi ja protektos nin, ĉu ne?“. Nun la policistoj kaj militistoj daŭre patrolas, sed kun hontema vizaĝo rigardas la civitanojn: ne, karuloj, ni ne povis kaj sendube neniam povos tute protekti vin.

Ĉu do nun regas paniko en la stratoj? Tute ne. La homoj butikumas prepare al la varmaj someraj tagoj, ili sidas sur la terasoj kaj trinkas sian bieron. Demandite, ĉu li ne timas nun sidi en publika loko, 72-jara antverpenano respondis: „Tute ne. Ĝuste tion la teroristoj esperas, ĉu ne? Ili deziras malstabiligi nian socion. Ili povas mortigi kelkajn inter ni, sed ili neniam povos mortigi nian spiriton, niajn idealojn pri libereco de

esprimado, nian respekton por la virinoj.“

Simile reagis la muzikisto Bent van Looy: „Ne, mi ne nuligos miajn koncertojn. Nun muziko estas pli grava ol iam ajn. Precize nun ni devas sendi belajojn en la mondon.“

La ĉefministro de Belgio, Charles Michel [ŝarl miŝél], tuj post la atakoj havis similan mesaĝon por la teroristoj kaj li alparolis ilin televide: „Ni defendos nian liberecon kaj protektos ĝin. Vi estas kovarda malamiko, sed ni restos kuraĝaj kaj kunaj.“

Same kiel post la atakoj en Parizo, multaj reagis per humuro. Aperis desegnaĵoj en kiuj la nacia simbolo de Belgio, la frito, aperas kiel suprenmontranta meza fingro kaj aliaj en kiuj la simbolo de Bruselo, la pisuleto, pisas sur la kalaŝnikovojn de la teroristoj. Multe da varmo do por kontraŭbatali la fridan atmosferon de la teroro.

Tamen estus nejuste priskribi nur la varmon, kiu ekregis inter la loĝantoj tuj post la atakoj. Inter la varmoplenaj homoj kaj inter la kantantoj de „Imagu!“ de John Lennon sin kaŝas pluraj centoj da aliaj, kiuj estis en Sirio kaj tie lernis kiel batali kontraŭ la okcidentaj valoroj. Ili estas inter ni. Ili sukcesis forlasi Sirion kaj nevidite reveni al Belgio por tie prepari siajn atakojn. Tiuj centoj ne estas rifuĝintoj, kiel provis ŝajnigi kelkaj orient-eŭropaj amaskomunikiloj, kaj pri ilia estado en Bruselo ne kulpas Angela Merkel. Almenaŭ tiuj, kiuj eksplodigis sin en Bruselo kaj en la apuda Zaventem, estis bruselanoj, homoj kun la belga ŝtataneco.

Kaj jen eble unu el la kialoj de la timo, kiu regas kune kun la varmaj sen-

toj de solidareco. Ibrahim el-Bakraoui, kiu eksplodigis sin en la flughaveno de Zaventem, naskiĝis en Bruselo, havis belgan pasporton. Post kiam li „finstudis“ en la tiel nomata Islama Ŝtato, ĉe la turka limo en Gaziantep, li estis arestita kaj aviadile sendita al Nederlando. De tie li senprobleme pluvojaĝis al Bruselo montrante sian belgan identeckarton. Kiom da Ibrahimoj estas inter ni?

Mi ridetis al ŝi, kaj ŝi reciprokis la rideton de sub sia vualo. Tio estis mia kaj ŝia malgranda kontribuo kontraŭ terorismo

Ĉu do la situacio estas senespera? Ĉu neniam ni plu estos sekuraj en okcidenta Eŭropo? Ne, ni ne perdu esperon. Ĉio en la historio havas komencon kaj finon. Tiuj kelkaj centoj, kiuj estas inter ni kaj deziras malstabiligi nian socion, finfine komprenos, ke ilia batalo estas vana, ke ili povos iom vundeti la socion, sed ke la vundoj saniĝos. „Venkos ni en gloro“ kantis iam la usona movado por civitanaj rajtoj de ĉiuj rasoj. La kanto estas pli aktuala ol iam. Venkos kristanoj, islamanoj, nekredantoj kaj ĉiuj de bona volo super la etmensa teroro.

Hodiaŭ matene, irante hejmen tra la pluvo, mi renkontis vualitan islamanon. Mi ridetis al ŝi, kaj ŝi reciprokis la rideton de sub sia vualo. Tio estis mia kaj ŝia malgranda kontribuo kontraŭ terorismo. Ni ĉiuj kontribuu same. ■

Ezra Clark STILLMAN (°1907-1995) estis usona universitata instruisto, sekretario de Belga-Usona Eduka Fondaĵo, kulturataŝeo de la usona ambasado en Bruselo kaj ekde 1937 li membris en la direktoraro de *International Auxiliary Language Association* (IALA), la asocio, kiu en 1951 publikigis la lingvoprojekton Interlingua. Li tradukis poezion kaj verkis proprajn versaĵojn en Esperanto kaj en la angla. La poemo "Duopa mondo mia" aperis en "Dekdu poetoj" (1934).

DUOPA MONDO MIA	(De) dubbele wereld van mij
1 En ĉi tiu gaja mondo (morto, murdo, pesto, rab')	1 In deze vrolijke wereld (dood, moord, pest, roof)
mi promenas frumatene, june, kiel juna knab'.	wandel ik 's morgens vroeg dartel als een jonge knaap.
5 Kaj en ĉi malgaja mondo (ho, la sun' en la ĝarden', kie laŭ la laŭb-aleo mi promenas dum maten')	5 En in deze droevige wereld (o, de zon in de tuin, waar, langs de loof-laan, ik 's morgens wandel)
9 ftizo sputas pulmumukon (ho, ĉi dolĉa rozparfum'), kaj armeoj blinde buĉas, sangas en sufoka fum'.	9 spuit de tering longslijm (o, dit zoete rozenparfum) en slachten legers blind, bloeden in verstikkende rook.
13 Ho duopa mondo mia (mi freŝvanga sub la sun'), vi frenezas, al mi ŝajnas (mi putronta sub la lun').	13 O dubbele wereld van mij (ik met frisse wang onder de zon), je bent gek, dunkt mij (ik die zal rotten onder de maan).

PRI LA POEMO

La titolo: Duopa mondo mia

Kial tia nekutima vortordo?

Ĝi tutspeciale akcentas la lastan vorton.

Kiucele° ĉi-kaze°? *met welk doel; in dit geval*

Tiamaniere la vorto kaj la kunteksto

akiras° pli da persona kaj *krijgt, verwerft*

senta valoro.

Verso 1: En ĉi tiu gaja mondo

Kian impreson donas la unua verso?

Ke temos pri tre agrabla, eble promesplena afero.

ĉi tiu aŭ tiu ĉi?

Zamenhof rekomendis ĉi tiu en Lingva

Respondo. Tiu ĉi estas francismo, multe uzata en Francio kaj Belgio.

gaja mondo. Kiel impresas tiu verso ĉe la unua legado?

Ĉu troiga°, mokema°, kritika, *overdreven; spottend* cinika? Aŭ ĉu male°, vere entuziasma? *integendeel*

Verso 2: (morto, murdo, pesto, rab')

Kial interkrampe (parenteze)?

La poeto volas klare montri, unue, ke ĉi tie ne temas pri la sekvo de la rakonto, due, ke la

vortoj 'gaja mondo' nevole sugestas al li

kontrastojn, antitezojn°. *tegenstelling*

Kion sugestas la sinsekvo° de la vortoj *volgorde* interkrampa?

Ĝi esprimas katastrofon. Fonetike la silaboj

ŝajnas soni laŭgrade° pli forte kaj *geleidelijk aan* agreseme°. *op agressieve manier*

Versoj 3-4: mi promenas frumatene,
june, kiel juna knab'.

Kiel kompreni la adverbon 'june'?

Kompreninda estas 'laŭ la maniere de...' (Ĉu supozendas, ke tiu 'mi' estas juna knab'?)

Kiel oni imagu, ke juna knabo promenas?

Tre verŝajne petoleme°, saltante, *dartel*

dancante, fajfante°, svingante° *fluitend; zwaaiend*

brakojn kaj krurojn°. *benen*

Kial juna knabo kondutus tiel?

Jen pruvo de...

bona sanstato, bona konscienco (?), troa energio...

Verso 5: Kaj en ĉi malgaja mondo

Komparindaj estas evidente la unuaj versoj de la

du strofoj. La poeto volas pritrakti° *behandelen* du malajn°. *tegenovergesteld*

Kial li ne ripetas la esprimon 'ĉi tiu' el la unua strofo?

Verŝajne por ne pezigi^o la verson. *verzwaren*

Kial li ne diris 'malĝoja' aŭ 'trista'?

Malĝoja ne estas necese la sama kiel malgaja.

Diferenco inter tiuj du:

ĝoja: blij (fr. joyeux, angl. joyous)

gaja: vrolijk (kp. gota^o gaheis (!), fr. gai) *Gotisch*

Verso 6: (ho, la sun' en la ĝarden',

Kial en tiu verso du elizioj^o? *mallongigitaj vortoj*

Verŝajne por eviti^o tro longajn *vermijden* versojn.

Krome^o eble por klare doni la impreson, *bovendien* ke li estas surprizita el sia ĵusa revado.

La frazo sonas preskaŭ kiel kriol!

Notinda ankaŭ estas la relative pli longa son-efiko^o de la du silaboj **-un'** *klankeffekt*

kaj **-en'**.

Kiel tiuj elizioj efikas ĉe la legado?

Pro la elizio la lastaj vokaloj akiras pli da akcentado. Oni povus imagi jen plian tempon por admiri la belecon de la pejzaĝo.

Kial aŭ kiucele estas ĉi tie elizio post la nazaloj?

Ĝi klare havas psikologian valoron: ĝi substrekas la admirantan emocion de la spektanto.

Kiel efikus tiu verso sen la elizioj?

Provu!

N.B. En versoj 2, 6, 10, 14, 16 estas la sama nombro da silaboj, dank' al la elizioj.

Versoj 7-8: kie laŭ la laŭb-aleo mi promenas dum maten')

Jen denove interesa **son-efiko**^o de iuj vortoj.

En verso 7 la ripetitaj 'l'-sonoj de la vortoj bone sugestas movon laŭlonge de io. Jen vere **esprimiva**^o verso. *uitdrukkingsvol*

Aparte rimarkinda estas en tiuj du versoj la **ripetado** de du sonoj (aliteracio).

Nome^o? *namelijk*

la sonoj 'l' kaj 'm/n'.

Kiel tiuj sonoj efikas al la orelo?

dolĉe, ne plozive, eĉ eble zume^o! *neuriënd*
mildige^o. *verzachtend*

Verso 9: ftizo sputas pulmomukon

Jen terura verso pro senco^o kaj sono! *zin, betekenis*
ftizo **sputas**=?

La malsano estas ĉi tie ... personigita.

Kp. Ndl. ftisis (tering), ftisisch (teringachtig).

Rimarkinda verso pro la **esprimplenaj son-efikoj**:
fti- spu- pu- mo- muk

La muziko de tiu verso realisme sugestas la sonojn tiakaze^o aŭdeblajn. *in een geval van dien aard*

Kontrastoj: denove la leganto devas salti de unu mondo al alia. Post la romantika bildo de la ĝardeno li estas lanĉata tien kaj reen^o. *heen en weer*

Verso 10: (ho, ĉi dolĉa rozparfum'),

Plia **kontrasto** kun la antaŭaj versoj.

Kial la aŭtoro ne diris normale

'ho tiu ĉi dolĉa rozparfum'?

Komparendas la **versritmo** de ambaŭ!

Kiel efikas tiu **mallongigado** *afkorting*
de la vortoj?

Ĝi bone sugestas la **spontaneecon** de la ekkrio^o. *uitroep*

Verso 11: kaj armeoj blinde buĉas,

Al kio referas tiu 'kaj'?

Al la antaŭe menciita(j) katastrofo(j).

blinde buĉas

Kian psikan efikon havas la du **b-silaboj**?

Ili fonetike sugestas la **krudecon** *ruwheid*
de la ago.

Kion sugestas tiu adverbo 'blinde'?

Ĉio okazas kruele, draste, senkonsidere.

Verso 12: sangas en sufoka fum'.

Denove jen tiu fonetika esprimovo de la

konsonantoj -s- kaj -f- dank' al la vortelekto!

Versoj 11 kaj 12 estas vere atente relegindaj por

bone aprezi^o la **aŭdan**^o *waardenen; gehoor/klank*

efikon de la vortoj!

Verso 13: Ho duopa mondo mia

Kroma esprimplena vortordo:

mia mondo / mondo mia *mijn wereld / wereld van mij*

same en aliaj lingvoj: dans ce monde à moi
in that world of mine

La son-efiko de tiu verso estas analizenda:

Temas fakte pri **duopa** son-efiko.

Verso 14: (mi freŝvanga sub la sun'),

Kio estas subkomprenita per la unuaj du vortoj?

Mi, kiu estas..., mi estante...

Kion supozigas la vorto 'freŝvanga'?

Ke li estas juna kaj bonfarta, juna sed sen sperto°.

ervaring

Kio estus la malo de freŝvanga vizaĝo?

vizaĝo sulketa, falta:

rimpelig

(falto, sulko = *rimpel*)

senfaltigo de la vizaĝo = *facelift*

Verso 15: vi frenezas, al mi ŝajnas

Kial la mondo ŝajnas frenezi al li?

Pro i.a.° la senfina batalado. *interalie, onder andere*

frenezi(ĝi) pro... ĝojo, ŝaluzo, amo, deziro...

imagi frenezigan situacion, ekzemple...

devi helpi, priservi plurajn personojn samtempe.

Kompletigu laŭ persona okazo:

Mi freneziĝus, se.....

Verso 16: (mi putronta sub la lun').

Ĉu jen verso konprenenda laŭlitere aŭ

figursense?

Ĉiakaze estas same neeviteble fini sian vivon

en ia ajn loko sub la luno aŭ la suno.

Ĉu la luno elektiĝis pro la rimo?

Ĝenerala impresio

La poemo pritraktas la duopecon° *dubbele natuur*

de nia mondo sur tiu ĉi terglobo° kaj, *aardbol*

tute logike, ĝi mem disvolviĝas° *ontwikkelt zich*

en duoblan observadon.

Unuflanke aperas la gaja etoso. Aliflanke la bela

mateno ne forigas la senton pri la malgaja

aspekto de la homa vivo. En la lasta strofo li

rilatigas tiun duecon al si mem. Li sentas sin

juna kaj gaja kaj li scias ke li mortos. Per

malmultaj vortoj ambaŭ flankoj de la homa

ekzisto estas trafe sugestitaj. Ankaŭ la son-

efikoj de multaj versoj tre lerte sugestas la

emocion de la parolanto.

Estas tamen rimarkinde, ke la perspektivo

ŝanĝiĝas de unu verso al alia. Tio cetere ne

estas hazarda°, sed intenca°. *toevallig; opzettelijk*

Krome, tiuj ŝanĝoj de perspektivo ene de unu

strofo estas klare indikataj per parentezoj.

PLIE PRI IUJ VORTOJ

Vortoj kun la finaĵo -OP- (titolo: duopa mondo)

-op- sufikso montranta kolektivecon (PIV)

Ekz.: Pasi unuope sur la ponteto = unu post unu

Resti duope en la ĉambro.

Ili promenis trioje.

Se io estas senpaga, homoj venas

multope°.

in groten getale

Ĉu la fratoj kantis unuope aŭ duope?

Z.: **Akiro kaj perdo rajdas duope.**

Het verkrijgen en het verliezen gaan samen. (letterlijk: rijden met zijn tweeën)

Zo gewonnen, zo geronnen.

Estas tute normale, ke ĉia akiro povas iam

perdiĝi.

Z.: **Multope ni pli frue finos la laboron ol unuope.**

Met velen zullen we het werk vroeger beëindigen dan alleen.

Vele handen maken licht werk.

Vango (vs. 14: freŝvanga)

Kial la **vango** estas kutime konsiderata bona

informilo° pri ies sanstato? *middel om te informeren*

Ĝia koloro kaj ĝia formo estas ofte sufiĉe

bonaj informiloj tiurilate°! *wat dat betreft*

Ekzemple: Kiel/kiaj aspektas vangoj de

(mal)junaj aŭ (mal)sanaj homoj?

Vangoj informas nin ne nur pri nia sanstato, ili

ofte informas ankaŭ pri ies humoro.

Ekzemple: Oni povas ruĝiĝi de...

honto, de plezuro, de grandega

streĉado°.

inspanning

Kia estas **pufvanga** homo?

met bolle vangen

homo havanta ŝvelajn° vangojn.

gezwollen

Kion povas indiki tiaj pufvangoj?

Multon! Ĉu bonan ĉu malbonan sanstaton aŭ

humoron.

La malo: **kavaj° vangoj.**

holle

La vangoj tiam estas...

kav(iĝint)aj, pal(iĝint)aj°.

verbleekt

Kavaj vangoj povas indiki malsan(ec)on. Sed Z

parolas pri '**kavetoj**' de fraŭlinaj vangoj. Tamen

ĉi tie ne temas pri malsaneco sed pri tiaj

precipe° videblaj kiam formiĝas...

vooral

rideto°.

glimlach

N.B. Kial **grundo** de vojo povas **kaviĝi**?

Pro tertremo° aŭ eksplodo aŭ forta *aardbeving*

pluvego (forta pluvofalo).

sidvango: eŭfemismo por pugo°, postaĵo° *zitvlak*

Ĉu vi jam aŭdis pri la **belpuga Afrodito**?

Helena diino de la belo kaj amo (en Romo:

Venuso). Ŝi estas celebrata pro siaj belaj

galboj°.

rondingen

Jen konsilo el la Nova Testamento:

Al tiu, kiu frapas vin sur la vango, prezentu ankaŭ la alian. Ĉu vere?

Jen certe facila konsilo, sed male° *integendeel*
malfacile sekvebla°! *moeilijk te volgen*

Kiel kompreni tiun konsilon el la Biblio?

Oni ne provu refrapi°, rebati *terugslaan*
sed oni male klopodu° ekscii° *trachten*
la kialon° de la ago° kaj *daad*
finfine alveni al paca pritraktado de la afero.

Ricevi, doni **vangobaton°**. *klap op de wang (om de oren)*

Kiu ricevas?

malobeema° infano. *ongehoorzaam*

Kiu donas?

malkontentaj gepatroj.

Kial tiaj batoj estas malkonsilendaj?

Z.: **Propran vangon neniŭ batas.**

Neniŭ punas sin mem.

Z.: **Fari al iu aplaŭdon sur la vangon.**

Fakte temas pri (iom) sarkasma, ironia rimarko farita al iu. Do tute ne pri ia konsilinda° aplaŭdo sed male pri ia *aan te raden*
ŝoka rimarko.

Kio ĝenerale° estas *over't algemeen*
prefere° ricevata sur la vango? *liever*

kiso°, kareso°. *kus, aaitje*

Putri (vs. 16: putronta)

1) = malkomponiĝi, se paroli pri organika substanco (PIV)

Z.: **De semo° putra venas frukto ne nutra°.**
Van rot zaad komt geen voedzame vrucht.

Z.: **Eĉ por pomo putranta troviĝas amanto.**

Jen vere grava konstato se temas pri homoj, kaj kiaj?

soifaj°, malsataj°. *dorstig; hongerig*

2) = morale difektiĝi (PIV)

Z.: **Laboro homon nutras° , sen laboro li putras°.** *voeden*

Ĉu vere? Ĉu komprenenda laŭlitere?

Z.: **Laboro fortigas, ripozo putrigas°.** *verrotten*

Ĉiakaze akceptebla opinio?

Z.: **Putrado de fiŝo komenciĝas de l' kapo.**

= Plej facile koruptiĝas altranguloj.

(De hoogst geplaatsten zijn het gemakkelijkst omkoopbaar.)

Amuza kromekzerceto: ekzerciĝi en la flua retradukado de la nederlandaj tradukaĵoj!

TRADUKEKZERCOJ

Solvo de la antaŭa

1) Metu la bluan de la maro kontraŭ la bluan de la maro, tiru en ĝin la blankon de velo kaj la vento leviĝas. (W. Hussen) 2) Ĉio eblas, escepte de la realigo de viaj revoj. (H. Wijdeveld)

3) Ĉiu atingita celo estas denove la komenciĝo de nova vojaĝo, kaj tiel ĝis en la senfino.

(Schopenhauer) 4) Ĉia surtera feliĉo baziĝas sur kompromiso inter revo kaj realo. (M. Prévost). 5)

La homo similas al aktoro, kiu neniam ekscias kiel la teatraĵo en kiu dum tuta akto li mem kunaktoris, plu disvolviĝos. (L. Fulda)

6) Variado estas la vera spicaĵo de la vivo, kiu al ĉio donas aromon kaj saporon. (W. Cowper)

7) La mondo estas menaĝerio, en kiu oni preterlasis disigi/separi la lupojn de la ŝafidoj. (M.L. Karadja)

Nova

1) De mens is het intelligentste van alle dieren - en het meest dwaze. (Diogenes)

2) Zelfs de eenvoudigste mens is nog altijd een zeer ingewikkeld wezen. (Marie von Ebner)

3) Niemand kan teruggaan voor een nieuw begin, maar iedereen kan vandaag beginnen met een nieuw einde. (Maria Robinson).

4) De mens is noch een engel noch een beest, en het ongeluk wil dat wie voor engel wil spelen, de beest uithangt. (Blaise Pascal)

5) We verkeren zo graag in de vrije natuur, omdat deze geen mening over ons heeft. (Nietzsche)

6) Als er onder de sterfelijke mensen iets bestaat dat uitgeroeid moet worden en dat ieder verplicht is met alle wettige middelen tegen te gaan en te helpen voorkomen, dan is het zonder twijfel de oorlog. (Erasmus)

7) Wat de pessimist ziet als een struikelblok, beschouwt de optimist als een opstap. (Eleanor Roosevelt)

Emiel Van Damme
Albert I-straat 44
B. 1703 Schepdaal

Mortis Kamilo Vanhulle.

Sepulta ceremonio okazis je mardo, la 5-a de Julio 2016

Kamilo ne estu kaj ne estos forgesata. *Ĉar* li estis viro multflanka, kun vastaj intereso, kaj tial vaste diskonata en la tutmonda medio de la Esperanto-Movado, ne kiel Kamiel Vanhulle sed per sia aŭtonomo Manuel Halvelik.

Kamilo estis viro kun alvokiĝo. Depost okulkreviga akcidento je aĝo de dudek jaroj li restis unuokula, sed ekhavis internan vizion. Ĝi trudis al li taskon en la vivo. Li komencis pensadi, kaj tridekjara ekverkis. Li serĉis ne nur la sencon de la vivo, sed allogite de sciencoj kaj pli profunda scio, li volis malkovri kio estas la materio; kiel ĝi ekestis, kaj de kie. El kio ĝi konsistas? Li esploris pri astroj kaj aliaj ĉielkorpoj. Li pristudis la funkcion de sunoj kaj de atomoj. Li havis fortajn konvinkojn.

Longjare Kamilo laboris duontempe kiel kompostisto por la esperanta presejo; samtempe li tradukis diverslingvajn tekstojn. En la restanta tempo, postulita de li, li dediĉis sin proprainciate al sia Esperanto kaj al siaj teorioj kaj farendaĵoj: al pensado kaj verkado.

Li estis viziulo. Li strebis kunligi religion kaj sciencojn, kredon kun faktoj kaj fenomenoj. Fakte li havis - kiel Zamenhof - du alvokiĝojn: unu religion, kaj unu lingvan. Li volis atesti la ekziston de Eternulo; li deziris uzi kaj ellabori la Internacian Lingvon. Kamilo estis tre religiema kaj interesiĝis pri lingvoj, pri ĝusta kaj justa komunikado. Li amis esperanton.

Detale li traktis temojn astronomiajn, kernfizikajn, evoluajn, religiajn kaj lingvistikajn. Kiel teoriisto li iris laŭ la spuroj kaj en la spirito de Ejnŝtejn. La *'big bang'*, la praknalon, li priskribis kiel manifestiĝon de Dio; li nomis ĝin teofanio en sia ĉefverko *La teorio pri ĉio* (antaŭe nomita *Sotragogismo*). Per simplaj eroj mikrokosmaj li kompletigas la makrokosman puzlon, klarigante misterajn fakistajn problemojn. Kamilo elpensis la plej elementajn korpusklojn - ok - konsistantajn el pura energio: moviĝo kombinita el tri bazaj fortoj: elektro, gravito kaj magnetismo. Li aplikas sian *triaksismon* poste al ĉio, eĉ al lingvoj.

Skribinte siajn verkojn originale, por la tuta mondo, en esperanto, sen diskriminacio lingva, li faris resumojn en la angla, franca kaj nederlanda; li ankaŭ tradukis.

Momenton mi meditas pri la persono. Ĉiam afabla, ĉiam gentile helpema, talente kaj kompetente li plenumis siajn taskojn, sian laboron.

Kamilo estis bona famiĉestro. Por zorgema edzino, du filinoj, tri genepoj. Kiel civitano li estis ĉiel kontribuema kaj bonvola; kreiva, diligenta, lojala. Eksterordinarulo, sed simpla, neniom aroganta. Li estis homo saĝa, kvietaj kaj serioza, sed ne sen sprito.

Li ne verkis beletrajn, sed kapablis verki eseojn. Li havis klaran, racian kaj belan stilon; li esprimis sin bonege kaj verkis leginde.

Ni estimas liajn scivolon, komprenon kaj realigojn; ni scias pri liaj celoj kaj sopiroj, ni konas lian pasion, lian pelatecon, lian penadon kaj malpigron; ni konscias ankaŭ liajn senreviĝojn. Certe, Kamilo, vi esperis, esperadis, pri pli da sukceso publika, pri iom da atento flanke de la sciencista mondo? Tamen, iĝinta 91-jara, vi produktis dum 60 da ili riĉaĵojn. Kara Kamilo, mankos al ni via persono, viaj prelegoj.

Al ci dankon Manuel.

Christian Declerck

Vrijdag 17 juni 2016

18.30u - 22.00u

BENEFIET-AVOND

... ten voordele van **Movado sen Nomo**, met een leuke "RISK"-kwis, geleid door Eddy Van den Bosch,

Op het menu:

"Chili con carne" (= vlees)

of

"Chili sin carne" (= veggie)

+ dessert



UNU KOMPLIKITA HISTORIO (2)

Estas malfacile por okcident-eŭropanoj bone kompreni la sistemon de Zamenhof rilate al tiuj diversaj apartenecoj, se ili ne rememoras, ke li rigardis sia misio la enkondukon de neŭtrala lingvo, kiel rimedo kontraŭ la intergenta frondeco kaj malamo. Li sekve rigardis la naciismojn, tiam konfliktantajn en la Rusa Imperio, per la skuloj de estonta arbitracianto, opiniante ilin barbaraj deflankecoj de la pura patriotismo, kaj tenante sin, laŭ la posta formulo de Romain Rolland, »supre de la miksbatalo«. Oni tiel malpli miros pri kelkaj liaj diroj, ekz-e pri lia letero al Javal post la pola insurekcio de Novembro 1905: »Por mi persone la plej malagrabla estas nur tio, ke mi nun en Varsovio tute jam ne vidas homojn: mi vidas nur Rusojn, Polojn, Hebreojn ktp., kaj ĉiuj sin reciproke malamas kaj ĉiu pensas nur pri sia nacio. La plej malfeliĉa estas la situacio de la Hebreoj, ĉar la Rusoj postulas, ke ili estu Rusoj, kaj la Poloj postulas, ke ili estu Poloj. En nia regno ĉiuj universitatoj estas fermitaj; en nia urbo eĉ la gimnazioj estas preskaŭ tute sen lernantoj, ĉar la Poloj postulas, ke ĉiu (eĉ ne Polo) lernu ĉion nur en la lingvo pola.« (HZL.p.117) Aŭ lia letero de 1912 al la Loka Kongreso-Komitato en Krakovo: »En la okazo, se Vi nepre bezonas paroli pri mia persono, Vi povas min nomi »Filo de pola lando« (ĉar neniu povas nei, ke la tero, en kiu kuŝas ambaŭ miaj gepatroj kaj sur kiu mi konstante laboras kaj intencas labori ĝis mia morto, estas mia hejmo, kvankam mi ne estas naciisto), sed ne nomu min »Polo«, por ke oni ne diru, ke mi — por akcepti honorojn — metis sur min maskon de popolo, al kiu mi ne apartenas. Ĉar, por eviti ian malgustan paŝon, Vi eble bezonas scii, al kiu popolo mi mem alkalkulas min, mi sciigas Vin, ke laŭ mia politika-religia konvinko mi estas nek Polo, nek Ruso, nek Hebreo, sed mi estas partiano de »Homaranismo« (ne miksu kun »kosmopolitismo«); laŭ mia deveno mi alkalkulas min al la gento hebrea.« (HZL.p.212-213).


Tiun lastan indikon pri religio ni lasu provizore flanke. Sed almenaŭ pri la politika estus bone aldiri kelkojn. En siaj sinsekvaj redakcioj de la »Dogmoj de Hilelismo« aŭ poste de »Homaranismo«, Zamenhof proponis anstataŭigi la landnomojn formitajn el popolnomoj per aliaj novaj, neŭtrale artefaritaj, por ke ĉiuj loĝantoj de tiuj landoj povu sin senti tie hejme, kia ajn estas ilia gento, lingvo aŭ religio. Li proponis ekz-e diri, anstataŭ »Polujo«, »Varsovilando« ktp. Tio multe indignigis la

Polojn, kaj ŝajnis al preskaŭ ĉiuj Esperantistoj stranga kaj senŝanca fantazio. Sed tiuj ne memoris, ke, je malpli vasta skalo, tion ĝuste faris kaj sukcesis enirigi en la uzadon la anoj de la franca Konstituciona Asembleo de 1789, kiuj, volante sufoki la partikularismojn de la malnovaj provincoj, decidis ilin dispecigi en departementojn, kaj doni al ĉi tiuj neŭtralajn nomojn. La historiajn pretendojn, lingvajn apartaĵojn kaj ekonomiajn egoismojn ekz-e de la Bretonoj aŭ de la Pikardoj radikale detruis ilia oficiala aparteneco al departementoj, kies nomoj devenis de geografiaj detaloj: aŭ Finistère (= Kabo de terfiniĝo), Côtes du Nord (Nordaj marbordoj), Morbihan (bretone: la maro), Isle-et-Vilaine (du rivernomoj), aŭ Aisne, Oise, Somme (tri rivernomoj), Pas-de-Calais (= Kaleza Markolo). Kia loka patriotismo povus fari, ke la loĝantoj de tiel nomataj departementoj pretendu al si la ekskluzivan posedon de tiuj regionoj? Se efektive estus okazinta, ke Polujo estus nomata »Vistullando« kaj Litovujo »Nemanlando«, Poloj kaj Litovoj estus rigardintaj sin kiel najbarojn, kiujn apartigas geografia hazardo, ne kiel ĉiam suspektatajn agresantojn; kaj juda aŭ germana aŭ belorusa malplimulto ne estus aperinta kiel aro da ĝenaj intruduloj.

Oni scias, ke bedaŭrinde la arda eltrovemo kaj revolucia klarvido de la francaj Konstitucifarintoj ne loĝis en la tro bonedukitaj cerboj de la Eŭropaj diplomatistoj; kaj, malgraŭ la solena alvoko de Zamenhof al ili en 1915, ili preferis sankcii la naciismojn, anstataŭ konstrui novan, sennacian Konfederacion Eŭropan. La minoritatojn oni transloĝigis, senkompatate pri la tiel estigitaj korŝiroj aŭ mizeroj — la Litovojn en Litovujon, la Blankrusojn en Belorusujon, la Polojn en Polujon, kaj la Judojn, post grandskala provo de plena neniigo, en Izraelion. Ĉu tiu enkaĝigo de ĉiu popolo interne de naciaj limoj estas vera progreso, pri tio oni povas dubi; kaj ne estas la satelitigado de tri el tiuj ŝtatoj en la orbito de Sovet-Unio, kiu prezentas kontentigan substituaĵon al la Zamenhofa homaranismo.

(1887 kaj la sekvo ... de Gaston Waringhien)

IN FLANDERS FIELD / EN FLANDRAJ KAMPOJ



Verkintoj: Herwig Verleyen - Tradukinto: Lode van de Velde

Originala lingvo: nederlanda

Formoj: libro kudre bindita €9.95 (-16% ekde 3 eroj)

Priskribo: Neniu poemo el la Unua Mondmilito estas tiel konata kiel 'In Flanders Fields' de la kanada armeokuracisto John McCrae. Afliktita de la hororo de la milito li verkis ĝin je la 3a de majo 1915 ĉe sia flegejo inter Ieper kaj Boezinge. La bruĝa aŭtoro Herwig Verleyen prilumas en tiu ĉi bone dokumentita eldono la vivrakonton de John McCrae kaj la estiĝohistorion de 'In Flanders Fields'. Li klarigas kiamaniere la poemo evoluis ĝis mondvasta simbolo de ofero kaj batalo por la paco kaj kiamaniere la papavo (poppy), nomita en la poemo, fariĝis la simbolo de ĉiuj pereintoj. Finfine la leganto konatiĝas kun tio kio en Flandrio kaj ankaŭ eksterlande memorigas je John McCrae kaj lia poemo.

Paĝoj: 70 - Larĝo: 147 mm - Alto: 210 mm - Eldonjaro: 2015 - Pezo: 185 g

Tre bonvena verko, sed ...

Pri la Unua Mondmilito en Nederlando relative malofte ion oni aŭdas aŭ legas. Nia tiuepoke eble plej fama aŭtoro, Louis Couperus, el la urbo, kie en Germanio li esperis fari brilajn raportaĵojn pri la heroa militado por sia haga taggazeto, verkis pri ĝi iom nostalgie kaj kun seniluziigo. Post nelonge li reiris hejmen, al Hago.

Tamen la Granda Milito, kiel prave oni titolis ĝin plurlingve, meritas pli da atento. Tial do estas tre bonvene, ke aperis *In Flanders Fields* de Herwig Verleyen el Bruĝo, kiu en Toronto fariĝis doktoro honoris causa pro sia multjara dediĉo konigi la verkon kaj vivon de John McCrae en Flandrio. Prave oni donis pro ĉi tiu *In Flanders Fields* al li la premion de la Asocio de Flandra-Naciaj aŭtoroj.

En la libro troveblas, laŭ mi, ĉio, kion en tia libro oni povas serĉi: la familio de John McCrae, ambaŭ gepatroj (la patrino eĉ legis latine kaj greke!), liaj gefratoj, la familia heredaĵo: estis tradicia tiufamilie la devo servi la patrolandon, sin dediĉi al la apuduloj kaj okupiĝi pri poezio. Ĉiuj tri fadenoj en John kuniĝis: li fariĝis militisto – kun ĉiam pli altaj rangoj, kuracisto – ankaŭ ĉiam pli altrange, kaj poeto, finfine internacie fama, eĉ se nur pro unu poemo.

Militaj spertoj

Liaj unuaj militistaj travivaĵoj, 1899-1901, estis en la milito inter la brita kolonia imperio kaj la sendependiĝemaj buroj. Pro la granda impreso, kiun multloke vekis la prezidanto de la buroj, Paul Krüger – en sia bonvolveka migrado laŭ eŭropaj kortoj kaj parlamentoj –, kaj pro la relative multaj gazetaj raportaĵoj pri la britaj unuaj koncentroj de la mondo, multaj homoj en Eŭropo certe spertis tiun militon multe malpli favore ol John McCrae, kiu vivis la britan flankon. Poste en Montrealo John McCrae rapide avancis kiel kuracisto, laboris pri aŭtopsoj, pri patologio, pri kontaĝaj malsanoj – instruis, verkis studlibrojn ktp. Ankaŭ poemojn fojfoje li aperigis.

En 1914 sekvis Flandrio. La germanaj trupoj, kontraŭe al ĉiu militjuro, ekuzis venengason: la linioj ambaŭflanke apenaŭ milimetrojn moviĝis. Mortis milionoj da homoj. Terura buĉado – John McCrae prizorgis vunditojn, akompanis mortantojn. Tiutempe li verkis sian plej faman poemon *In Flanders Fields*. Manskribaĵon en la libro oni vidas.

Verleyen detaleme provas montri la ekzaktajn datojn kaj ankaŭ tion, kio plejfunde instigis lin al la verkado ĝuste tiumomente. Post tio li rezonas, kiuj ecoj de la poemo kaŭzis, ke ĝuste ĉi tiu fariĝis la blazona poemo pri la Unua Mondmilito.

La poemo mem

Kelkaj etaj ĉapitroj montras la postan historion: malsaniĝo de John McCrae kaj morto. Tiam venas pluraj reagaj poemoj al ĉi *In Flanders Fields* en la angla, plus kelkaj tradukoj en Esperanton.

La dua parto de la libro enhavas plurajn „Rememorojn” pri la aŭtoro kaj la poemo. La tuton sufiĉe trafe ilustras diversaj fotoj. Entute tre inda libro pri fame konata poemo, kiu pripensigas pezajn momentojn el nia homa historio.

Tamena bedaŭro

Pri la traduko kelkfoje mi ne povas fieri: eble plej ĝene estas, ke por la angla larks oni prenas, eble pro sonimito, la vorton „lariksoj”, sed, kiel sciante, tiaj arboj ne flugas. Ankaŭ enestas kelkaj aliaj lingvaj eraretoj, „preĝejo” (konstruaĵo) por „eklezio” (institucio), „presbitera” („presbitero” estas homo; vidu PIV) por „presbiteriana”, fojfoje „lia”, kie konvenus „sia”, sed, kutime, la eraretoj ne donas kialon miskompreni.

Tamen, la tradukinton mi dankas, ĉar li havigis al nia publiko valoran atestaĵon pri inda poemo pri tiu terura Unua Mondmilito.

Gerrit BERVELING



CLUBPROGRAMMA'S

Tenzij anders vermeld zijn alle vergaderingen gratis en voor iedereen toegankelijk. Let wel dat de meeste activiteiten in het Esperanto plaatsvinden. Uiteraard zijn we steeds bereid geïnteresseerde bezoekers in het Nederlands te woord te staan.

ANTWERPEN – La Verda Stelo, Esperanto Antwerpen vzw

Alle programma's hebben plaats in het *Esperantohuis*, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, in het clublokaal op de eerste verdieping. Ĉiun vendredon je la 20 h, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, ankaŭ en julio kaj aŭgusto. Lokaal is open ook tijdens de vakantiemaanden juli en augustus. Het programma zal tijdig verschijnen op volgende webstek: <http://esperanto-antwerpen.weebly.com/>.

BRUGGE- Paco kaj Justeco

Geen samenkomsten voorzien in de komende maanden.
Por pliaj informoj: Heidi Goes, heidi.goes@gmail.com - tel.: 050 / 67 51 78

BRUSSEL - Fervojisto

Conversatiecursus - (ook niet-spoorwegmensen welkom). In het gebouw van het Centraal Station, Brussel, Cantersteen 10 - 1ste verdieping studio A 1ste & 3de woensdag van iedere maand telkens van 13.30 tot 15.30 uur

BRUSSEL – Esperantista Brusela Grupo

www.esperantobruselo.org
Vergaderplaats: *gebouw Van Maerlant* (hoek van de gelijknamige straat en de Belliardstraat, tegenover het Leopoldpark, dicht bij het metrostation Maalbeek). Elke woensdag van 18 u.30 tot 20 u.00.
Aangezien dit gebouw tot de Europese Instelling behoort, is er een vrij strenge controle. Bezoekers gelieven zich op voorhand aan te melden.
Contact: Françoise Pellegrin

DILBEEK

Konversacia rondo, plej ofte la *unuan sabaton* de la monato, *Ontmoetingscentrum Westrand*, Kamerijkstraat 46, 1700 Dilbeek, ekde 14 u.00 ĝis 16 u.00 en salono club 1.
Pro organizaj kialoj bonvolu anonci vin ĉe Lydia Buyst.
Pliaj informoj: Lydia Buyst 054 / 33 01 51; www.westrand.be.

GENT – La Progreso

<http://www.esperanto/gent>
Iedere *vierde vrijdag* van de maand is er een clubvergadering in ons lokaal *La Progreso*, Peter Benoitlaan 117, 9050 Gentbrugge.
Inlichtingen bij Katja Lödör, tel. 19 / 230 16 77 of 09 / 221 10 02.

KALMTHOUT- La Erikejo

<http://users.telenet.be/La.Erikejo/index.htm>
La kunvenoj de La Erikejo okazos kiel kutime en la *Parochiecentrum* de Heide, kiel kutime monate ĉiun trian jaŭdon, inter la 19 h 30 kaj la 21 h 30.

KORTRIJK- Koninklijke Esperantogroep La Konkordo

www.esperanto-kortrijk.info
Maandelijkse bijeenkomst in *Erfgoedhuis*, zaal Lessius, eerste verdieping, O.L.Vrouwstraat 45, Kortrijk (tel. 056 / 27 74 24) elke vierde dinsdag van de maand van 19 u.30 tot 21 u.30. Indien de vierde dinsdag een feestdag is, dan op de derde dinsdag.
Contact via e-mail piet.glorieux@gmail.com en esperantokortrijk@hotmail.com.

LEUVEN – Vespero 3000

<http://www.esperanto.be/esperanto3000>
De bijeenkomsten hebben elke tweede woensdag van de maand plaats in het *Cultureel Centrum. Romaanse Poort*, Brusselsestraat 63, 3000 Leuven, vanaf 19 u.45; de lezingen beginnen om 20 u.00.

OOSTENDE -La Konko

Gespreksnamiddag elke maandag 17 u. - 16 u. (niet op 16/5) in Ontmoetingscentrum De Boeie, Kerkstraat 35
Pliaj informoj: Marc Cuffez (flandrio@hotmail.be) aof 0486/362365 (s avonds) of Flory Witdoeckt (flory2@witdoeckt.be) of www.lakonko.be
Geen activiteiten in de zomer. - We starten terug in september

PEER -Limburga esperanto-Asocio

De Limburgse Esperanto Vereniging (LEV) organiseert geen activiteiten in juli en augustus

TIENEN – La Hirundo

<http://www.lahirundo.be>
Info: Bert Boon, Merelhof 8, 3300 Tienen, tel.: 016 / 81 52 46, bert.boon@skynet.be of post@lahirundo.be

VERDAJ SKOLTOJ

www.verdajskoltoj.net
Esperanto-staĝo por 10-16 jaraĝuloj: 3-9 aprilo 2016, Bouillon
Printempa Esperanto-Kongreso (PEKO): 4-8a majo 2016, Namuro
informoj: Valère DOUMONT 0485/517552 info@verdajskoltoj.net

NieuwebijzonderecollectiebijErfgoedbibliotheek Hendrik Conscience

Op 30 mei ll. keurde de Antwerpse Gemeenteraad een **Samenwerkingsovereenkomst** goed tussen enerzijds *Erfgoedbibliotheek Hendrik Conscience* (EHC) en anderzijds de *Vlaamse Esperantobond vzw* (VEB). Daarbij staat deze laatste het grootste deel van haar boeken af aan de EHC om bewaard te blijven als bijzondere collectie onder de benaming “Flandra Esperanto-Biblioteko” en om onder de gebruikelijke voorwaarden ter beschikking gesteld te worden van wetenschappers en onderzoekers, naast de gewone geïnteresseerden.

Aanleiding van de overdracht is het nakend hersituëren van het Esperanto-huis van Frankrijklei 140 naar de Lange Beeldenstraat (*Tailors Armando*). De verhuis vindt plaats in de komende maanden. Door de voortaan kleinere behuizing is er minder ruimte voor een eigen omvangrijke bibliotheek. De VEB is evenwel van oordeel dat, dankzij de schenking aan EHC, een hoogstaand en meer divers lezerspubliek zal kunnen bereikt worden.

In deze nieuwe locatie hoopt de VEB ook, door letterlijk en figuurlijk haar toegangsdrempel te verlagen, binnenkort vlotter en frequenter voeling te krijgen met een verscheiden taalminnend publiek. Het zal ook voor ieder mogelijk zijn, er zich documentatie en boeken aan te schaffen en er een praatje te komen maken over Esperanto en de taalproblematiek in 't algemeen.

Contactadressen in Nederland

<http://www.esperanto-nederland.nl/ned/regionale-groepen.php>

ALKMAAR

Marijke Lathouwers, Kruiswin 1205, NL-1788 LE Julianadorp
tel. +31(0)223 643 781, alkmaro@ziggo.nl

EINDHOVEN

Jeannette Bosse, Veld. Montgomerylaan 361, NL-5612 BH Eindhoven
tel. +31(0)402 113 344, jeannette.bosse@tiscali.nl

FRIESLAND

Frisa Esperantista Rondo, Wiebren Akkerman, Westerein 14a,
NL-8571 GB Harich, tel. +31(0)514 602 272, wiebrenakkerman@hetnet.nl

GRONINGEN & DRENTE

Nelly Kiel-Klunder, G. Sterringastraat 60, NL-9728 VV Groningen
tel. +31(0)505 251 436, nrkielklunder@hotmail.com

HAARLEM

Corrie Kwantes, Marnixstraat 57, NL-2023 RB Haarlem
tel. +31(0)235 276 561

HELMOND

Toine Gremmen, Nassastraat 3, NL-5707 HL Helmond
tel. +31(0)492 544 472, info@twangremmen.nl

NIJMEGEN

Klubo Zamenhof, Jan Bemelmans, Zwanenveld 2287,
NL-6538 PS Nijmegen, tel. +31(0)243 882 926

ROTTERDAM

Esperantoclub Mercurio, Atie van Zeist, Park Vossendijk 331,
NL-3192 XG Hoogvliet, tel. +31(0)104 161 449, moerbeek@gmail.com

Andere nuttige adressen

Vlaamse Esperantobond / Flandra Esperanto-Ligo

Frankrijklei, 140, B-2000 Antwerpen, tel. 03 234 34 00
info@fel.esperanto.be, www.esperanto.be

Vlaamse Esperanto Jongeren Vereniging / Flandra Esperanto Junulara

Asocio p/a Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Tel.: 03 234 34 00
info@fel.esperanto.be

ILEI-Belgio (Esperanto leraars): Marc Cuffez, Elisabethlaan 295, 8400 Oostende,
tel.: 0486 36 23 65, marc.cuffez@telenet.be

Verdaj Skoltoj

ruelle de Thuin 20, B-6540 Lobbes, tel. 071 16 53 95 kaj 0485 517 552
info@verdajskoltoj.net, www.verdajskoltoj.net

Association pour l'Esperanto,

p/a Marcel Delforge, rue des Glacières 16, B6001 Charleroi (Marcinelle), tel. + fax:
071 43 14 13, mardelforge@brutele.be, <http://esperanto-wallonie.be/>

Belga Esperanto Fervojista Asocio (Spoorwegesperantisten),

Lucien De Sutter, Stockholmstraat 49 bus 2, 8400 Oostende,
tel. 059 50 18 25

Esperanto Nederland, secretaris, p/a Ineke Emmelkamp

Arubastraat 12, 9715 RW Groningen, tel. 050 571 88 42,
info@esperanto-info.nl

Hoofdkantoor van de Esperanto WereldVereniging/Centra Officejo de UEA

Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam,
tel.: 00 31 10 436 10 44, info@uea.org

Bestuursleden van FEL

<i>Voorzitter:</i>	Ivo Vercammen
<i>Secretaris:</i>	Nicky Janssen
<i>Penningmeester:</i>	Marc Cuffez
<i>Bestuursleden:</i>	Griet Symoens, Cyreen Knockaert, Eddy Van den Bosch, Henri Schutters

Contactadressen in Vlaanderen

ANTWERPEN

Esperanto-Antwerpen, p/a Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen,
tel. 03 234 34 00, esperanto-antwerpen@esperanto.be
La Verda Stelo: Voorzitter : Ella Strug

BRUGGE

Paco kaj justeco, Heidi Goes, Assebroeklaan 2, 8310 Brugge,
tel. 050 67 51 78, heidi.goes@gmail.com

BRUSSEL

Françoise Pellegrin, Eiklaan 14, 1640 St-Genesius-Rode,
fransuaz@esperantobruselo.org, tel. +32 2 358 27 28
Ivo De Keyzer, sekretario@esperantobruselo.org

GENT

La Progreso, Katja Lödör, Peter Benoîtlaan 117, 9050 Gentbrugge,
tel. 09 230 16 77, gent@esperanto.be

KALMTHOUT

La Erikejo, Mireille Smet-Storms, Douglaslaan 14, 2950 Kapellen,
tel.: 03 666 83 19, mireillestorms@hotmail.com

KORTRIJK

La Konkordo, Piet Glorieux, Pastoor Blanckestraat 8 bus 0201,
8610 Kortemark,
tel.: 051 62 39 28, piet.glorieux@gmail.com,
Jean-Pierre Allewaert, Tarwelaan 10, 8500 Kortrijk,
tel. 056 20 07 96, esperantokortrijk@hotmail.com

LEUVEN

Esperanto 3000, Roger Goris, Rue Ménadastraat 44, 1320 Hamme-Mille,
tel. 010 86 01 12, goris.r@skynet.be

LIMBURG

Limburgse Esperantovereniging
Henri Schutters, Panhovenstraat 10, 3930 Peer,
tel. 011 63 55 92, henri.schutters@skynet.be

DILBEEK

Lydia Buyst, tel. 054 33 01 51, lydia.buyst@scarlet.be

OOSTENDE

La Konko, Marc Cuffez, Elisabethlaan 295, 8400 Oostende,
tel. 0486 36 23 65, marc.cuffez@telenet.be

ROESELARE / TIELT zie KORTRIJK

TIENEN

La Hirundo <<http://www.lahirundo.be>> Info: Bert Boon,
Merelhof 8, 3300 Tienen, tel. en fax: 016 81 52 46, post@lahirundo.be
sekretario@esperantobruselo.org

TURNHOUT

Maria Dom, Tuinbouwstraat 14, 2300 Turnhout,
tel. 014 41 72 92, de.groot-dom@telenet.be